

La 8an de aprilo 2013

Rato kaŭzis akcidenton

Je la 18:57 de la 18a de marto elektra paneo okazis en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, kaj haltis elektro por 9 gravaj instalaĵoj, nome la konservejoj de uzitaj nukleaĵoj de la reaktoroj n-ro 1, 3, 4 kaj aliaj ses dum ĉirkaŭ 30 horoj. Uzitaj nukleaĵoj ankoraŭ eligas varmegon. Se oni malsukcesos malvarmigi ilin, povos okazi, ke radioaktiveco eliĝos. La kaŭzo estis rato.


Laŭ la klarigo de TEPCO, la paneo okazis ĉe la distributabulo, kiu estis instalita tie provizore post la akcidento. Tial la dratoj estis simple kovritaj per plastaĵoj. TEPCO diras, ke inter tiuj plastaĵoj rato eniris. Oni diras, ke en vintro ĉe distributabuloj estas varme, tial ratoj foje eniras kaj difektas la dratojn. TEPCO neglektis fari tiun simplan, necesan aferon.

TEPCO ne tuj informis la respektivajn guberniojn kaj urbojn pri tiu grava akcidento. Ĝi eksciis la haltigon de malvarmiga sistemo je 19:45, sed du horojn poste ĝi sendis tiun informon al la gubernio Fukuŝima, kaj tri horojn poste al la ĵurnalistaro. Multaj eksaj loĝantoj, kiuj nun loĝas for de la centralo, timas, ke okazos nove grava akcidento kaj hezitas aŭ rezignas reveni al sia hejma urbo.

Bestoj ofte kaŭzas problemojn. Antaŭe multaj meduzoj kolektiĝis ĉe la kanaletoj, tra kiu oni prenas marakvon por malvarmigo, kaj haltigis la reaktorojn. En la ĵurnalo la 25an de marto aperis artikolo pri korvo. Metala vestarko, kiun ĝi uzis por sia nesto, falis sur la fervojan draton kaj haltigis aŭ prokrastis trajnojn. Respondeculo de tiu fervoja kompanio diras, ke estas malfacile fari kontraŭrimedojn. Eĉ malgrandaj bestoj povas okazigi grandajn akcidentojn, kaj homoj ne povas bone kontraŭstari ilin. Tia okazis ankaŭ en la nuklea centralo.

La 5an de aprilo TEPCO publikigis, ke la malvarmiga sistemo de la reaktoro n-ro 3 haltis je la 14:27. La problemo okazis denove en la distributabulo. Tie homoj laboris por kovri ĝin per metala reto por preventi ratojn, kaj tie ial okazis la paneo. Nerekte sed certe, ankaŭ ĉi-foje rato kaŭzis la akcidenton. Je la 17:20 la problemo solviĝis.

120 tunoj da poluita akvo tralikiĝis



Bildo el TV-elsendo NHK la 8an de marto. La konservejo oranĝkolora sube kaj maldekstre likis. TEPCO jam konstruis 7 konservejojn (oranĝkolorajn kaj flavajn) en la sama konstrumaniero, do povos okazi, ke ankaŭ la aliaj likos.

La 6an de marto TEPCO publikigis, ke likis la subtera akvokonservejo en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Ĝi estas 60 metrojn longa, 53 metrojn larĝa kaj 6 metrojn profunda, kaj en ĝi konserviĝas 13000 tunoj da poluita akvo. La tuta kvanto de eliĝinta radioaktiveco estis 710 miliardoj da bekereloj. La 7an TEPCO publikigis, ke ankaŭ alia konservejo likas.

En la reaktorojn n-rojn 1, 2 kaj 3 oni enverŝas 370 tunojn da akvo ĉiun tagon por malvarmigi la degeliĝintajn nukleaĵojn. Poste el tiu poluita akvo oni elprenas cezion, kaj parton oni reuzas por la malvarmigo. La alian parton oni konservas en konservujoj por pli purigi. Krome, ĉiun tagon 400 tunoj da akvo fontas de la tero kaj fariĝas poluita.

TEPCO konstruadas akvokonservejojn. Nun la kapacito estas 325000 tunoj, sed jam 80% estas plena. Se TEPCO ne povos uzi tiujn likajn akvokonservejojn, ĝi alfrontos pli da malfacilo. Se ĝi ne plu povos konservi akvon, kion ĝi faros? Ĝi foje aludas pri la intenco forĵeti la akvon en la maron. Fiŝistoj kompreneble kontraŭas tion, kaj ankaŭ tiu forĵetado kaŭzos internacian kritikon al TEPCO kaj Japanio. La nuklea akcidento tute ne finiĝis.

HORI JASUO